

Usona Esperantisto

Dumonata bulteno de Esperanto-USA • Numero 2011:5 (sep-okt)

American Esperantist


Bi-monthly bulletin of Esperanto-USA • 2011:5 (Sep-Oct)



BONVENON AL LA AMIKECA VESPERO

TEMO : Jaro de la arbaroj

ESPERANTO	ENGLISH	FRANÇAIS
KOLOROJ	COLOURS	COULEURS
FLAVA	YELLOW	JAUNE
RUGA	RED	ROUGE
BLUA	BLUE	BLEU
VERDA	GREEN	VERT
GRIZA	GRAY	GRIS
BLANKA	WHITE	BLANC
NIGRA	BLACK	NOIR
ORANĜA	ORANGE	ORANGE
ROZA	PINK	ROSE



Ĉi-numere:

- Instruado: *Competency-based Education*
- Daŭrigo de *Du jaroj kamerune*
- Novaj enigmoj
- ...kaj multe pli!

Taglibro de la Aŭtuna Renkontiĝo de Esperanto (pĝ. 8)

(fotoj danke al partopreninto Andy ROSENBAUM)

Usona Esperantisto

Dumonata bulteno • *Bi-monthly bulletin*

Vol 50, No 5 — 2011:5 (sep-okt)

Redaktisto • *Editor*: HOSS FIROOZNIJA

Sendu kontribuojn al • *Send contributions to:*

✉ bulteno@esperanto-usa.org

📍 Usona Esperantisto, c/o Hoss Firooznia
CPU 271205, U. of Rochester
Rochester, NY 14627-1205, USA

Usona Esperantisto (American Esperantist) is the bi-monthly magazine of Esperanto-USA. We welcome contributions in both Esperanto and English; please use email if possible and include your name, your address, and a close-up photo. With other photos please include the name of the photographer and subject(s), location, and date. We will return materials by mail if you include a self-addressed, stamped envelope.

You may reprint content two months after publication if you give credit; please send a copy of any reprinted materials to the address above. Opinions expressed are those of the individual authors and do not necessarily reflect the views of the editor or of Esperanto-USA.



Usona Esperantisto estas la dumonata bulteno de Esperanto-USA. Ni bonvenigas kontribuojn kaj en Esperanto kaj en la angla. Prefere uzu retroŝton, kaj aldonu viajn nomon, adreson kaj foton de via vizaĝo. Al aliaj fotoj bonvolu aldoni notojn pri datoj, lokoj, kaj nomoj de foti(n)toj. Ni perpoŝte resendos materialojn se vi sendas mem-adresitan, afrankitan koverton.

Oni rajtas reaperigi materialojn du monatojn post la eldondato, kun fontindiko. Bonvolu sendi ekzemplerojn de republikigita materialo al la supra adreso. Opinioj esprimitaj ĉi tie apartenas al la individuaj aŭtoroj, kaj ne nepre spegulas vidpunktojn de la redaktisto aŭ de Esperanto-USA.



Centra Oficejo • *Central Office*

✉ PO Box 1129, El Cerrito CA 94530 USA

☎ 510.653.0998; 2510.653.1468

✉ info@esperanto-usa.org

http://esperanto-usa.org

Direktoro • *Direktoro, CO*: William B. HARRIS

Prezidanto • *President*: Orlando E. RAOLA

Vicprezidanto • *Vice President*: Philip G. DORCAS

Sekretario • *Secretary*: Steve BREWER

Kasisto • *Treasurer*: Christopher ZERVIC

Aliaj estraranoj • *Other board members*: George

BAKER, Neil BLONSTEIN, Steven CYBULSKI, D. Gary GRADY, Tor KINLOK, Julie SPICKLER, Ĝan STARLING, Julie WINBERG, Christine WINGROVE.

Korekto

En n-ro 2011:4 aperis scienca artikolo *La stereo-metodo de kreta pentrado*. La atribuo de tiu artikolo estis erara. Originale verkis ĝin nia membro Alex GOFEN; Barry FRIEDMAN poste poluris ĝin kaj plusendis al la redakcio. Ni bedaŭras kaj pardonpetas pro la eraro.

Korespondi deziras

22-jarulo loĝanta en *Rutshuru*, apud la landlimo de DRK kaj Ugando tre ŝatus interŝanĝi salutmesaĝojn en Esperanto.

Joel MUHIRE, PO Box 08 Bunagana-Kisoro/ Ugando aŭ <muhire.joel@yahoo.fr>

In passing: Edna STEIN

Life member Edna Stein passed away September 25th in West Hills, California at the age of 94. She was active with Esperanto-USA for over 40 years, first in St. Louis and later in Los Angeles. She is survived by her three children (Floyd Stein of Copenhagen, Denmark, Ronald Stein of Los Angeles, California, Diane Graden of Austin Texas), seven grandchildren and twelve great-grandchildren.

(Report from Diane GRADEN)

Ricevu UE-on elektronike!

Aliĝu al la listo de ricevontoj! Tuj kiam freŝa papera versio presiga, vi ricevos retmesaĝon kun la adreso de rete elŝutebla versio. Por aliĝi, sendu mesaĝon al:



bulteno@esperanto-usa.org

We need you! Your membership fees help promote Esperanto and provide services to speakers and students across the country. Members receive the bi-monthly magazine *Usona Esperantisto*, the *Membership List*, discounts from the Book Service, access to online resources (mailing lists, blog space, etc.) and a discount at the national convention. Please join (or renew) today!

Return with payment to: **Esperanto-USA, P.O. Box 1129, El Cerrito CA 94530**

Name: _____

Address: _____

City & State: _____

Postal code & Country: _____

Phone: _____ E-mail: _____

Birthdate (MM/DD/YY): ____/____/____

In the member list, don't publish my: postal address phone email address

Send me info on joining the *Universala Esperanto Asocio*

Please check **one** category of membership/support:

- Friend of Esperanto \$10.00
(not a membership, but you receive 3 issues of the newsletter)
- Youth *(you must be under 27)* \$20.00
- Limited Income \$20.00
- Individual \$40.00
- Family \$60.00
- Sustaining \$80.00
- Life *(birthdate required)* \$800.00

I would like to receive the magazine, *Usona Esperantisto*, in:

Paper form only Electronic (PDF) form only *(email address required)* Both

Credit card info: Visa Mastercard

Number: _____ Expires(M/Y): ____/____

Card verification #: _____ *(three digits on back of card, or on front for AmEx)*

Upcoming events

For a comprehensive list of upcoming events worldwide, see <<http://www.eventoj.hu>>.

November 19 – 20 (Harrisburg, PA)

Urba semajnfino

Organized by *Vikipedio*-founder Chuck SMITH, the Esperanto City Weekend returns to Harrisburg for 2011. Activities include trips to Indian and Thai restaurants, a tour of Hershey's Chocolate World, and a visit to the National Civil War Museum. For more information and a sign-up form, see <<http://is.gd/harrisburg2011>>.

Week of December 15

Esperanto-Tago (Esperanto Day)

December 15th, the birthday of Ludwig Zamenhof, marks an event celebrated around the world as "Esperanto Day." Many groups celebrate on the closest weekend, which this year occurs on the 10th–11th or 17th–18th. Check with your local group to find out if they have a special event scheduled!



January 11 – February 12 (Hainan, China)

Kursaro ĉe la Esperanto-Insulo

Intensive courses for beginners led by instructor Dennis Keefe, creator of the *BEK-Kursoj*; teaching methodology for Esperanto instructors by Katalin Kovats; and university-level courses for experienced speakers on a variety of topics with instructors Ron Glossop and Federico Gobbo. Very affordable meals and lodging in an exclusively Esperanto-speaking environment at the University of Hainan on the tourist island of Hai Nan Dao. <<http://esperanto-insulo.info>>.



Local groups

Below are contact addresses for some of the larger local groups that meet regularly. Please send any updates to <bulteno@esperanto-usa.org>.

California

Sacramento: <http://esperanto.org/us/esos>

San Diego: <http://groups.yahoo.com/group/EsperantoGrupodeSanDiego>

San Francisco:

<http://esperanto.org/us/SFERO>

Santa Barbara: dorothyjeanh@gmail.com

Colorado (Longmont) <http://ek-ek.org>

Connecticut (Wallingford) <http://esne.net>

District of Columbia <http://esperantodc.org>

Georgia (Atlanta) <http://esperanto-atlanta.org>

Hawaii (Honolulu)

<http://esperanto.org/us/Honolulu>

Idaho (Boise) <http://terpomuloj.org>

Illinois

Champaign-Urbana: <http://ekoci.org>

Chicago: <http://esperanto-chicago.org>

Maine (Bangor, Houlton) <http://esne.net>

Massachusetts (Acton, Amherst, Cambridge, Northampton) <http://esne.net>

Missouri (St. Louis) <http://esperanto-stl.org>

New Jersey (Princeton)

<http://esperanto-nj.tripod.com>

New York

New York: <http://esperanto-nyc.org>

Rochester: <http://esperanto.lodestone.org>

North Carolina (Raleigh Durham)
<charles.o.mays@gmail.com>

Texas

Austin: <http://esperantaklubo.konfuzo.net>

Dallas: <http://esperanto-tx.org>

Virginia (Hampton Roads) <http://bonege.com>

Washington (Seattle)

<http://seattleesperanto.org>

Wisconsin (Madison)

<http://groups.google.com/group/esperanto-societo-madison>

Kion konservi kaj kion ŝanĝi ĉe *Usona Esperantisto*

Inter la ĉefaj agadoj de Esperanto-USA troviĝas sendube la eldonado de nia asocia bulteno *Usona Esperantisto*, kiu sub diversaj nomoj, servas kunlige al la asocioj ekde la plej fruaj jaroj de nia landa asocio. Ekde la naskiĝo de Esperanto mem, periodaĵoj ludis aparte gravan rolon rilate la evoluigon kaj normigon de la lingvo kaj la kreadon de komunumo kiun kunligas apartaj valoroj, ideoj kaj historio. En la nuna tempo, daŭre staras la bezono de la esperantistoj interrilati por pli bone alpaŝi al komuna celo, ĝui kaj evoluigi nian lingvan komunikilon, ĝui la beletrajn kreaĵojn de niaj talentuloj, informiĝi kaj amuziĝi per Esperanto.

Sed por plenumi ĉiujn tiajn rolojn, *Esperantisto* devas rapide adaptiĝi al mondo ege rapide ŝanĝiganta. La ekapero de Tut-Tera Teksaĵo fine de la pasinta jarcento, la ĝeneraliĝo de rapidaj retkonektoj kaj rapidaj komputiloj, la apero kaj disvastiĝo de retkapablaj poŝtelefonoj, la ekesto de t.n. “sociaj komunikiloj”, provizas novan pejzaĝon neignoreblan kaj pro tio, indas de tempo al tempo zorge pripensi kaj analizi nian agadon, cele al enkonduko de plej konvenaj ŝanĝoj. Eĉ se mi bone komprenas, ke ĉe kelkaj homoj la emo ŝanĝi, renovigi, adaptiĝi, pluevolui ne trovas naturan akcepton. Tiu grupo preferas konservi la malnovan, eviti eksperimentojn, pluri la jam tretitan vojon anstataŭ ekpaŝi en virgan teritorion. Nu, temas pri nepreteratentebla trajto de la supre menciita pejzaĝo. El la reciproka paca interbatalo inter la grupo kiu puŝas antaŭen kaj la konservemuloj, ĉiam naskiĝos nova irenda vojo, espreble sufiĉe komprom-



Orlando E. RAOLA

Orlando estas prezidanto de Esperanto-USA. Li loĝas en Greenbrae, Kalifornio. Vi povas kontakti lin per la adreso:

oraola@gmail.com

isa, tiel ke ambaŭ grupoj povu aliĝi al la ĉaro, kiu kondukos nin al la estonteco.

Kiel promesite, en tiu ĉi numero de *UE* mi volas starigi profundan diskuton pri la estonteco de tiu ĉi publikigaĵo. Mi prezentos unu el la eblaj vojoj, mi esperas ke multaj legantoj reagu, apoge aŭ kontraŭstare, tio ne gravas, kaj ĉerpante el ĉies respondoj ni ellaboros gvidliniojn por la daŭra vivado de la asocia organo. Do, jen mia persona imagbildo pri la estonteco. Mi ne trovis pli bonan nomon por tiu ĉi strategio, tiel mi nomos ĝin **VARIANTO UNU**:

UE fariĝu precipe (kaj preskaŭ ekskluzive, vidu malsupre) elektronika publikigaĵo. En la nova retejo de *UE* vi trovos la kutiman enhavon: artikolojn, leterojn de la legantoj, reagojn al aperintaj tekstoj, beletraĵojn, novaĵojn, amuzajojn, oficalajn sciigojn de la asociaj gvidorganoj, ktp. La reta eldonado provizos manieron efektive disigi la tekstojn kiuj aperas Esperante de tiuj kiuj aperas nacilingve, donos laŭbezone ligojn al aliaj retejoj, kaj plej grave, ĉiam estos ege aktuala, ĉar ne plu estos atendotempo de la momento kiam materialo estas preta ĝis kiam ĝi estas havebla por la legantoj. *UE* estu libere havebla ĉe la reto, kaj daŭre aperu sub la gvidado de ties ĉefredaktoro. La legantoj konsciuj, ke ne pro

(*Daŭrigo en pĝ. 10*)

Competency-Based Education

Back in the 1980s I served on a committee that helped design a curriculum for an associates degree program at a technical college. Our task was to help develop a list of specific things that graduates of the program should be able to do, and to review proposed versions of the curriculum to make sure it seemed likely to impart the knowledge and skills in question.

This was my first exposure to something called “competency-based education” or “competency based learning,” one of those notions that seems so obvious once you hear it that you wonder why it isn’t used more often. In fact, it is in widespread use today, for example at the innovative Western Governors’ University.

The basic idea, applicable to everything from developing a professional curriculum to planning a one-on-one tutoring session, is to base your teaching on a list of things a student needs to know and to be able to do—so-called “competencies.” For example, in a beginning Esperanto course being able to pronounce the sound made by each letter would probably be one of the competencies we would want to teach.) Good teachers—and good authors of textbooks and courses—do something like this instinctively, even if they don’t think in exactly these terms.

How do you know what competencies to include? You can try sitting down and making a list from scratch as the thoughts come to you and then go back and organize it later. In fact, that’s not at all a bad way to get started. However, you



D. Gary GRADY

Gary is Vice President of the American Association of Teachers of Esperanto (AATE). He lives in Durham, NC.

dgarygrady@frontier.com

might find it easier to take a more organized approach. For example, try starting with a core goal and build out from it.

Let’s suppose you want to teach a course on conversational Esperanto. If your goal is too vague—say, “to impart the ability to carry on a reasonably fluent conversation in Esperanto,” you’ll probably find that too nebulous. You need something more concrete.

What are students likely to know already at the start of the course? How long will the course last and how often will it meet? What sorts of conversations are the students likely to have, and in what surroundings? (Are they likely to attend a major *kongreso* soon? Will they be using the *Pasporta Servo*?) Try to think about specific situations they’re likely to encounter and how they might handle them and what they’d need to know to do that. Also think about what resources are available for teaching the course—other teachers who could be present in person or via Internet video perhaps? Could you incorporate anything from *Lernu*? What do the students themselves want to learn? What do experienced speakers wish they had learned sooner?

You could try to answer those questions on your own, guessing when you’re

not sure, but it makes sense to do something similar to the technical college I mentioned. I don't mean you need to create a formal committee, but why not seek suggestions from potential students, other experienced Esperanto speakers, foreign language teachers, and so on? Also, as you develop your proposed list of competencies, you can run it by them for comments and suggestions.

It can help to make your list in a structured fashion, like an outline. You can use an outlining tool in a word processor or a separate specialized outlining program if you want, or you can simply use a basic word processor or text editor and group things by line spacing and indentation, whatever you find convenient. The point of a structured list is to help you think of things to include and notice where there might be gaps. If you're teaching a grammar course, you might list the parts of speech, then go back through, and under nouns put a section on the accusative case, with sub-sections covering the various uses of the accusative (direct object, direction toward, etc.).

Incidentally, even when working on your list in this top-down way, remember to write down random ideas that occur to you. Otherwise you'll go crazy trying to remember them later. Believe me, I know this from experience. That's one of the main ways I went crazy.

Also, don't be surprised if your list of competencies includes items not about language in the narrow sense. Most foreign language classes now cover cultural knowledge, such as the use of gestures (including which ones to avoid). I once saw Atilio Orellana Rojas start a class for

relative beginners at a *Universala Kongreso* by discussing gestures, for example.

Once you have your list of competencies you're not done. You still need to plan out your course, among other things deciding how best to impart those competencies to the students and in what order. (Especially in a direct-method course such as the *Cseh-metodo*, the sequence of topics can be critical.) But having that list means you are at least have a good beginning, and makes it much more likely that your students will end up with the knowledge and skills they most need. ★

Senintencaj esperantaĵoj?



Tapiŝvendejo, ventoturbino, kaj restoracio –
ĉiuj en Kopenhago. Dankon al UK-
partoprenintoj Steven BREWER kaj Randy
DEAN.

Ĉe la 18-a Aŭtuna Renkontiĝo de Esperanto (ARE)

Ĉe la Landa Kongreso de Esperanto-USA en Vaŝingtono, mi renkontis multajn agrablajn esperantistojn. Du el ili estis Krisjo kaj Kaitlyn el Roĉestro, Nov-Jorkio. Mi vizitis Krisjon en Januaro, sed krom tio, ni ne estis vidintaj unu la aliajn jam de longa tempo.

Antaŭ iom da tempo Krisjo sciigis min pri la 18-a Aŭtuna Renkontiĝo de Esperanto kiu okazis de la 8-a ĝis la 10-a de Oktobro, 2011 en Silver Bay, Nov-Jorkio. Mi nun loĝas en Albany, kvar aŭ kvin horojn for de Roĉestro, kaj survoje de tie al Silver Bay, do ni tri decidis kune ĉeesti la renkontiĝon.

Krisjo kaj Kaitlyn venis al Albany vendredon, la 8-an, kaj tranoktis ĉe mi. Ni kaj tri el miaj amikoj faris ĝojfajron ĉe la domo de mia amiko. Estis malvarme ekstere, do ni ĝuis la varmecon de la fajro. Ni babilis (anglalingve – buuu – ĉar miaj amikoj tie ĉi (ankoraŭ) ne parolas Esperanton) pri diversaj temoj, inkluzive de lingvoscienco, ekonomiko, kaj vegetarismo.

Sabaton ni foriris al ARE. Unue, ni haltis por tagmanĝi kaj aĉeti manĝaĵon ĉe kooperativa manĝaĵvendejo en Albany. Mi ŝategas tiun lokon. Estas multegaj freŝaj fruktoj kaj legomoj de lokaj farmistoj, kaj ankaŭ diversaj preparitaj vegataraj manĝaĵoj.

Kiam ni alvenis al ARE, okazis prelego pri goo, tabulludo originale de orienta Azio. Mi neniam ludis, kaj la prelego ŝajnis tre interesa, sed mi bedaŭrinde kaj embarase ekdormis dum ĝi. Senkulpiĝante min, mi tre lacis pro la antaŭa nokto kaj pro la vojaĝo.



Andy ROSENBAUM

Andreo studis lingvosciencan kaj matematikon ĉe la Universitato de Florido. Li ofte ĉeestas Esperanto-aranĝojn kaj vojaĝas per Pasporta Servo.

andy919@gmail.com

Post tio, ni pagis por la Renkontiĝo (kontraŭ nur po \$5, kiel studentoj), kaj iris al la dometo, kie ni restis. Estis ĉirkaŭ tridek homoj entute, kaj pli-malpli duono de ni restis ĉe tiu dometo. Ni kunkuiris veganan manĝaĵon (multaj el ni estas vegetaranoj aŭ veganoj), vespermanĝis, kaj reiris al la ĉefa kongresejo.

Tie, Normando FLEURY, prezidanto de la Esperanto-Societo Kebekia kaj organizinto de la renkontiĝo gvidis interkonan vesperon. Unue, ni disiĝis en grupetojn, kaj prezentis nin unu al la aliaj. Ĉiu elektis koloron el listo, kaj klarigis al la aliaj grupetanoj la kialon por tiu elekto.

Sekve, ni sidiĝis en granda rondo, kaj ĉiu prezentis sin al la plena grupo, dirante sian nomon, de kie ŝ/li venas, kaj tri vortojn por priskribi sin. Mi elektis la vortojn *pensado*, *lernado* kaj *kuirado*. Estis diversaj respondoj, multaj interesaj kaj pensigaj, kaj kelkaj humuraj – ekzemple “mi ne scias.”

Fine, ĉiu ricevis papereton kaj skribis ĉu-demandon sur ĝin. Normando kolektis la paperetojn, miksis ilin kaj redisdonis ilin. Tiam, ĉiu legis sian novan demandon, kaj ĉiuj aŭ stariĝis por respondi “jes” al la demando, aŭ sidiĝis por respondi “ne.” Denove, estis diversaj re-

spondoj, sed la demando kiun mi plej klare memoras estas: “Ĉu vi parolas Esperanton al via hejmbesto?” Mi stariĝis por tiu.

Mi ĝuegis la interkonan vesperon. Mi opinias, ke Normando tre bone organizis ĝin, kaj, ke la interkonaj ludoj kiujn li elektis estas aparte taŭgaj por tia ĉi lingvo-renkontiĝo. Se/kiam mi instruos la anglan kiel fremdan lingvon, mi tutcerte prunteprenos liajn ideojn.

Poste, ni reiris al la dometo kaj ludis *Dixit*, kartoludon kiun mi fakte unue ludis en Esperantujo ĉe la Somera Esperanto Studado de Lernu! en Slovakujo en 2009.

La unua tago de la renkontiĝo plaĉegis al mi, kaj mi ekdormis ridetante, ĝoja esti en Esperantujo denove.

Dimanĉon mi vekiĝis, matenmanĝis, kaj kuris en la arbaro apud la lago. La vetero estis neatendite varma, kaj la arbaro estis belega. Mi preskaŭ estis fininta mian kuradon, kiam mi preterpasis la

ĉefan kongresejon kaj vidis ĉiujn pretegiĝantajn por la grupfoto. Bonŝance mi alvenis ĝuste antaŭ la fotado. Sekve mi revenis al la dometo kie ni restis, duŝis min, kaj kuiris veganan tagmanĝon kun miaj samdometanoj. Krisjo ankaŭ bakis ege bongustajn veganajn kuketojn. Hura!

Tiun posttagmezon, Krisjo prelegis pri *La alia lingvo problemo: Kial lingvoj mortas? Ĉu gravas?* Multaj lingvoj en la mondo havas malmultajn parolantojn, kaj ili estas mortantaj, ĉar infanoj lernas lingvojn kun pli multaj parolantoj. Ekzemple, indiĝenaj lingvoj en Usono malaperis, ĉar infanoj lernis la anglan anstataŭe. Ĉu gravas? Ĉu ideoj kaj kulturo perdiĝas kun la lingvo? Kion ni povas fari?

Kompreneble, kiel esperantistoj, ĉiuj havis multon por diri, do post kelkaj minutoj ni rearanĝis la seĝojn en rondon, kaj ni diskutis la temon plengrupe. (Tio estas, “ARE”, ĉu ne?)



ARE

Ekstere estis ankoraŭ belege, kaj Normando gvidis nin promeni tra la arbaro, montrante kaj priskribante al ni diversajn specojn de plantoj kaj birdoj. (Ĉio en Esperanto, kompreneble. Kian grandan vortostokon havas Normando!)

Tiun nokton ni ludis tabloludojn kaj kartludojn. Mia plej ŝatata ludo estis Bananagramoj, esperantigita versio de la anglalingva ludo *Bananagrams*. Se vi neniam ludis ĝin, ĝi estas krucvortludo simila al Skrablo, sed multe pli rapida. Ĉiu ludas unu kontraŭ la aliaj, kaj rapidiĝas krei krucvortkradon, uzante ĉiujn siajn literojn. Ne estas vicoj – ĉio okazas samtempe, kaj ĉiuj kuras ĝis la fin'. Alia ĝuindega tago en Esperantujo.

Lundo estis la tria kaj fina tago de ARE 2011. Post la oficiala fermiĝo, mi aĉetis ekzempleron de *La Eta Princo*, esperantlingva versio de la fama francalingva romano *Le Petite Prince*. La libro mem estas belega, kun malmola kovrilo kaj koloraj desegnoj de la originala aŭtoro. Mi iom legis la originalan version kiam mi studis la francan, sed estis malfacila por mia mezalta nivelo de la franca. Mi legas multe pli bone en Esperanto, kaj ĉi-foje mi komprenis ĝin pli bone kaj ĝuis ĝin pli.

Ni babilis (ankoraŭ en Esperanto) survoje al Albany, kaj post kiam ni tagmanĝis, Krisjo kaj Kaitlyn foriris al Roĉestro. Mi pasigis la restaĵon de la tago ludante flugdiskon ĉe parko kun miaj geamikoj en Albany. Estis strange paroli la anglan, kaj kelkfoje mi senintence preskaŭ ekkriis “iru, iru!” “jen!” “ho, ve!” “ĉu?” kaj aliajn esperantaĵojn.

Mi malĝojis forlasi Esperantujojn, kaj ŝajne, mi cerbo sentis sin simile. ★

de la prezidanto (daŭrigo de pĝ. 5)

tio ke nia organo nun fariĝas elektronika kaj libere havebla la asocio ne plu bezonas la aliĝon kaj kotizon de ĉiuj membroj: ni daŭre subtenu la asocion kaj daŭre la kontribuo de la membroj ebligu al ni pagi la retan gastigadon de UE, la laboron de la redaktoro, ktp. Se asociano daŭre preferas paperan version, kompreneble li aŭ ŝi estu libera mem printi ajna(j)n paĝo(j)n de UE por trankvila legado sur la privata velboato aŭ aviadile survoje al internacia aranĝo. Se asociano sciigas al ni ke ili ne disponas la eblecon aliri/legi la surekranan version, tiam la redaktoro kunmetos du- aŭ tri-monatan kompilaĵon de la aperintaj materialoj kaj sendos ĝin surpapere al la koncernuloj, ankaŭ al bibliotekoj kaj kolektantoj.

La modelon por tiu ĉi VARIANTO UNU mi transprenis (tute konscia pri la gigantaj diferencoj!) de la ĵurnalo *The Christian Science Monitor*, kiu miaopinie faris ĝis nun la plej sukcesan transiron al elektronika aperformo, sed daŭre aperas papere por tiuj legantoj kiuj preferas legi paperan ĵurnalon (kaj pagi por ĝi), eĉ se la papera versio ne plu aperas ĉiutage, sed nur kiel ĉiusemajna resumo.

Kara leganto: nun estas via vico. Se vi estos kontenta pri la adopto de VARIANTO UNU, bonvolu sciigu tion al ni. Se vi absolute ne pretas por la transiro, ankaŭ tion esprimu. Se vi volas dividi kun ni viajn kialojn, des pli bone. Kaj fine, se vi volas mem kontribui propran varianton, tio ankaŭ estos bona. Espereble el la kontribuo de multaj cerbumantoj, la nova bultena formo ek estos kaj gvidos nin al la estonteco. ★

Matching Contributions

Do you work for a company that matches employee charitable contributions? Perhaps your spouse works for a matching gift company? Have you retired from a matching gift company?

If so, your charitable contributions to Esperanto-USA (incorporated as the Esperanto League for North America, Inc.) or the Esperantic Studies Foundation may generate additional funds to support the educational purposes of Esperanto nonprofits in the United States.

What are matching gift companies? Many large companies offer charitable matching gifts to encourage employee generosity and as an enhancement to overall benefit portfolios. IBM, Visa, and many other companies offer this benefit.

How do I find out if my company or the company from which I retired will match my charitable contributions, specifically to Esperanto-USA and the Esperantic Studies Foundation?

1. Contact the Human Resources Office of the company where you work or from which you retired and ask to speak with a benefits specialist.

2. If the company has a matching gifts program, request information about which nonprofit organizations qualify and where you can obtain the matching gift form. Some companies match gifts only for higher education or cultural organizations or math and science education. Many others, however, will match an employee contribution to any qualified IRS 501(c)3 organization. See IRS Publication 78 at <<http://irs.gov/app/pub-78>>. Because Esperanto-USA was incorporated as the Esperanto League for North America, Inc., you will need to use that



Patricia EGAN

Patricia eklernis Esperanton kiel infano. Ŝi servis kiel estrarano de UEA-Novjorko kaj estas dumviva membro de UEA, Esperanto-USA, kaj SFERO.

<pje875@gmail.com>

name, not Esperanto-USA, on your matching gift form.

3. Complete your company's matching gift form and send it to Bill Harris at the Central Office (see the address on page 2). If the gift is for the Esperantic Studies Foundation, Bill will forward the form to ESF. If your company matches 1:1, for every \$50 or \$100 (or more) that you give, Esperanto will receive an additional amount equal to your contribution.

This is a quick and very easy way to generate additional support for Esperanto educational programs in the United States. ★

Senintencaj esperantaĵoj?



Ĉu vino vere famega... aŭ nur fanfarona?



Ne aĉetu tiun "magian" pilkon tro impete, aŭ ĝi povus fushigi al vi la buĝeton.

“Kien vi iras?”

Hodiaŭ estis *Koh*, la dua tago de la oktaga “kampara” semajno. Dum ĉiu Koh okazas plen-aera komercado en la apuda vilaĝo Guzong. Mi avide atendadis ĉi tiun Koh-on kaj ĝian komercadon: ne restis multaj manĝaĵoj ĉe mi. Fakte, dum la lastaj du tagoj mi manĝis nur sal-kubojn kaj cepojn. Do, mi feliĉe min pretigis ĉi-matene, forskuis la blatojn el miaj aĉetad-sakoj, kaj eliris el la domo.

Mia najbaro sidis ekster sia domo. Li nomiĝas Papa Douala. Li pasigis sian junecon en la urbego Douala kie oni parolas la francan. Mi salutis lin.

“*Bonjour monsieur. Ça va?*” (“Bonan matenon sinjoro, kiel vi?”)

“Dankon. Mi fartas... nu... mi almenaŭ estas ankoraŭ ĉi tie... atendante la morton.”

Ni ambaŭ ridis. Li iam suferis rikolt-akcidenton kiu preskaŭ distrancis lian



Joshua MORRIS

Joshua estas esperantisto de Vaŝingtonio kiu nun deĵoras en Kameruno por la usona Pac-Korpuso.

josxuo@gmail.com

piedon. Nun li povas marŝi nur dolore.

“Kien vi iras?” li demandis.

“Al Guzong.”

“Ho, Guzong. Mi bezonas brasikojn.

Mi petas, ĉu vi aĉetos du por mi? Ĉu jes? *Merci beaucoup.*”

Mi marŝis al la vilaĝ-placo, preterpasante vilaĝanojn kiuj salutas min: “Bonan matenon! Kien vi iras? Bonan matenon! Kien vi iras?”

Mi renkontis sinjorinon Weriwoh antaŭ ŝia *chop house*, speco de malgranda restoracio. Mi salutis ŝin en la loka lingvo: “*A no! A sa ah ghu?*” (“Bonan matenon! Kiel vi?”)



La vilaĝo de Ewoh, fotita de apuda monteto.

“*Bati bati, muyaka!*” (“Bone, dankon!”). Poste ŝi ridis kaj diris ion, kion mi tute ne komprenis.

“*Ej*”, mi respondis, jese. Kiam mi ne komprenas, mi ĉiam respondas per “jes”. Kutime tio konvenas, sed ne ĉi-foje.

“Mi demandis, kien vi iras”, ŝi ridis.

“Ho, mi trompiĝis. Mi iras al Guzong.”

“*Wandaful!* Mi petas, ĉu vi aĉetos ion por mi?”

“Kompreneble”, mi respondis. “Kion vi bezonas?”

“*White pepa and black pepa*”, ŝi diris, donante al mi monon. “Nun, iru kaj revenu.”

Mi iris. Survoje mi ekvidis mian amikon, George. Li estas *tapper*, samkiel la plejparto de la vilaĝanoj. Tio signifas, ke li iras al la arbetejo por ellasi sukcon el palmoj por fari palmvinon.

“Bonan matenon, George. *A sa ah ghu?*”

“*Bati, muyaka*. Kien vi iras?” li demandis.

☆☆☆

Mi alvenis al Guzong. Tie mi ekvidis alian volontulon en la Pac-Korpuso, Amy. Mi kaŝe sekvis ŝin dum kelkaj paŝoj, kaj tiam kriis “Blankulo! Kien vi iras?” Ŝi saltetis kaj turniĝante al mi diris “Tre amuza vi estas, Joshua.”

Ni vagis ĉirkaŭ la komercadejo dum ŝi rakontis historiojn de la lasta, memorinda, semajno: ŝi tranĉis sian manon, kelkaj komputiloj rompiĝis ĉe ŝia lernejo, kaj ŝi falis de motorciklo en koton kaj poste, la kondukisto demandis, ĉu ŝi edziniĝus al li.

“Kaj?” Mi demandis.

“Kaj kio?”

“Via respondo! Ĉu mi devas pretiĝi por la geedziĝo?”

“Ha! Tre amuza vi estas.”

☆☆☆

Mi revenis al Ewoh. Mi vizitis al Papa Douala. “Vi estas reveninta?” li demandis.

“Jes. Jen viaj brasikoj.”

“Ha, *merci beaucoup*.”

Poste mi iris al la *chop house* por doni la pipron al s-ino Weriwoh. “Vi estas reveninta?” ŝi demandis.

“Jes. Jen via pipro.”

Ŝi rigardis konfuze la sakon da spicoj. “Ĉu vi tion aĉetis per la mono, kiun mi donis al vi?”

“Jes. Kial?”

“Mi volis *white and black paper*”, ŝi klarigis, montrante al mi la plastik-sakon. “Mi neniam antaŭe pensis ke ‘papero’ signifus ‘plastik-sakon.’”

“Ho! Mi trompiĝis! Mi aŭdis *pepper*. Mi bedaŭras.”

“Ne grave.” Ŝi ridetis. “Vi provis, do dio benu vin.”

Tiam mi vidis George-on, venintan el la arbetejo.

“Vi revenis?” li demandis.

“Jes.”

“Bone. Ĉu vi venos al mia domo por trinki palmvinon?”

“Tio estas la plej bona demando, kiun mi aŭdis hodiaŭ, George. Mi sekvas vin. Antaŭen!”

Mi haltis kaj turnis min al s-ino Weriwoh. “Mi iras al la domo de George. Diru al la aliaj! Dankon.” ★

enigmoj

Inter la solvintoj ni lotumos \$10-rabaton de la libroservo de Esperanto-USA. Ĉiuj membroj rajtas partopreni, sed solvoj nepre alvenu al la redakcio, aŭ poŝte aŭ rete, **antaŭ la 30-a de Decembro**. (Adreso de la redakcio troviĝas en pĝ. 1.) Bonŝancon!

Horizontale

- 1 Inter HST kaj JFK
12
- 4 "Perdinta la kapon pri ___ ne ploras."
15
- 9 Spaco difinita por io
18
- 12 *La infana* ___ o
24
- 13 "Ne ___ tago elkreskis Kartago."
31
- 14 Mezurunu' miloble pli granda ol tiu en 55 vertikale
41
- 15 Alveni, aviadile
51
- 17 Difektita loko, tra kiu fluas likvaĵo
54
- 18 Unua parto de proverbo en n-ro 46 horizontale
57
- 20 Preno de io kiel rimedo por atingi celon
58
- 21 Peceto
59
- 22 Poŝtkodo por *Wounded Knee*
- 24 Kaŭz' de ĉagreno por multaj dekkelkjaruloj
- 27 Dezerta insul'?
- 29 Entuziasma akcept' amasa

1	2	3		4	5	6	7	8		9	10	11	
12				13						14			
15				16					17				
18								19					
				20				21			22	23	
24	25	26		27		28		29		30			
31				32		33		34		35			
36				37		38		39		40			
41				42		43		44		45			
				46				47			48	49	50
51	52					53							
54				55						56			
57				58						59			

31 Blanka bastonet' por skribi

33 "Kiu bone sidas, tiu ___on ne ŝanĝu."

35 Obstinul'

36 Verki artikolon pri aktualaĵoj en iu fako

38 ___ŝildo

40 Objekt' por surkovri ion enigitan en ĝin

41 Membriga afikso

42 S-ino, en *San Juan*

44 Paŭziga sign'

46 Dua parto de proverbo en n-ro 18 horizontale

51 Naciec' de Claude PIRON

53 Registri librojn en biblioteko, ekzemple

54 Brustost'

55 Organa tub'

56 "Forfluu infano kune kun la ___o"

57 "___ ŝlosilo ĉion malfermas."

58 Oleoriĉa

59 Lirika poemo, aŭ sciencfikcia rolo de aktoro René AUBERJONIS

Vertikale

1 Fajroŝpiranta best'

2 Brillokolora flor', aŭ kataluna artisto superrealisma

3 "___ sinjoro de via vorto."

4 Kredo kontraŭ-ortodoksa

- | | | | |
|--|---|---|---|
| 5 " ____ paradizo deziras, sed pekoj retiras." | 17 "Li ĵus elrampis el ____ ŝelo." | 30 Kontinent' kie okazas la kursaro <i>Esperanto-Insulo</i> (vd. pĝ. 4!) | <i>Amerika Esperantisto</i> |
| 6 Hontema? | 19 Titolo por kuracisto aŭ sciencisto (mll.) | 32 Spasme elspiris | 48 Unupeca vesto, de kolo ĝis gamboj |
| 7 "Urson al mielo ____ tiras per orelo." | 22 Okaz' emociiga | 34 Penas plaĉi, foje flirte | 49 Daura uz' de kapablo por produkti efikon |
| 8 Ĝi ofte troviĝas samfrazo kun "des" | 23 Sovaĝa hund' aŭstralia | 37 ____ for! | 50 Homa busto kaj ventro |
| 9 Estis malgranda? | 25 Raspite, la manĝebla radiko de tiu plant' havas odoron mustardecan | 43 Turkuja ĉefurb' | 51 Signifo de <i>Mr.</i> , en Miĉigano |
| 10 "Kie ____as, tie ni gratas." | 26 Fratinofil' | 45 Afikso kiun evitas vortoj kiel <i>frida</i> , <i>kurta</i> kaj <i>liva</i> | 52 Malin' |
| 11 Frakcio, aŭ japana kantistino | 28 Taliĉirkaŭigil' | 46 Ideale modela | 55 Baza masa mezurunuo (mll.) |
| 16 URL-a finaĵo | | 47 lama eldonisto de la gazeto | |

Enigma matematika

En parko estis pendŝnura baskulo kies du brakoj ne estis egale longaj.

Iun tagon, kiam kelkaj knaboj ludis tie, preterpasis sumoisto (angle: *Sumo wrestler*). La knaboj petis al la sumoisto, ke li pendu de la ŝnuro de la baskulo.

Ekvilibro okazis kiam tri knaboj pendis de la alia ŝnuro. La sumo de la pezoj de la tri knaboj estis 108 kg.

Poste, la sumoisto pendis de la aliflanka ŝnuro. Tiam necesis kvar knaboj por ekvilibrigi la baskulon. La sumo de la pezoj de la kvar knaboj estis 147 kg.

Do, kiom estas la pezo de la sumoisto?



[Tiu enigma sendis direktoro Vilĉjo HARRIS, el libro nomita "Gimnastiko por cerbo" de TACUMI Hiroŝi, havebla ĉe nia rebutiko. La solvo aperos venontnumere. —Red.]

Solvo de la enigmo en n-ro 2011:4: Tomio komencis legi la libron *Morto de Artisto*, Petro legis 80% de *Fajron mi sentas interne*, Daniele legis 40% de *Bona Lingvo*, kaj Andrea finis legi la libron *Ŝtona Urbo*.

Mia Espero

Zamenhof parolis pri *nova sento*, kaj la Esperanto-komuno povas helpi efektivigi tiun senton. Unu nova sento, aŭ nova ideo, estas la *mikrokredito*, elpensita de la bangladeŝa ekonomikisto Muhammad JUNUS, kiu ricevis Nobel-Premion en 2006.

Lia ideo inspiris la fondintojn de la organizaĵo Kiva <<http://kiva.org>>, kiu ebligas al volontuloj pruntedoni etajn sumojn al diligentaj entreprenistoj al kiuj mankas bazaj financaj servoj kiel asekuro, bankokontoj kaj kreditkartoj. Kiva ofertas aliron al tiaj bazaj servoj per mikrokreditoj, por helpi homojn en malriĉaj landoj fondi kaj kreskigi siajn entreprenojn.

Unu brila ideo de Kiva estas “teamoj”. Ekzistas Esperanto-teamo, sed bedaŭrinde ĝi havas nur dudek anojn. Ni esperantistoj povas fari pli bone!



Jason DONEV


Jason estas profesoro de fiziko. Li esperantistiĝis en 2005 kaj ĝuas ŝakludi kun esperantistoj en fremdaj landoj. Li loĝas en Kalgario kun sia edzino, filino de 13 monatoj, kaj du kavioj.

lennythelabrat@gmail.com

Por mi, la plej grava sento de Esperanto estas: “mi estas parto de la mondo”. Kiel kanadano, mi ĝuas multajn luksaĵojn. Mi ne estas riĉa, sed kanadano ofte havas iom da mono, kaj oni povas vivi kun malpli. Kial doni monon al Kiva? Ĉar estas pli bone oferti helpon ol oferti donacon.

Do, miaj samideanaj amikoj, ni bezonas vian helpon. Ni povas helpi vin helpi aliajn. Mi petas vin: iru al <<http://kiva.org>> kaj serĉu teamon *Esperanto*. Kun vi, nia mono, nia amo kaj nia amikeco iros per flugiloj de facila vento. Nun de loko flugu ĝi al loko. ★

New in the E-USA bookstore



SIDARTO

Hermann HESSE

Rakonto pri la vivo de samtempulo de Gotamo Budho, Sidarto, kaj pri lia serĉo de atmano, t.e., de la nedetrubla, unueca kaj eterna esenco de la spirito. Mole bindita. 126 p. 2010. Usono. **\$13.40**

Order from **Esperanto-USA, PO Box 1129, El Cerrito CA 94530**, or online at <<http://esperanto-usa.org/retbutiko>>.

More complete descriptions can be found online. If a title is out of stock, the online bookstore can notify you by email when it becomes available again. Thanks largely to fluctuations in the value of the dollar, all prices are subject to change without notice.

Skribu al Avo Frosto!

Malgraŭ tio, kion vi eble aŭdis post la infanaĝo, Avo Frosto ja ekzistas! Li loĝas en Kanado kaj parolas multajn lingvojn, inkluzive de Esperanto. Jes, vere! Vi povas sendi al li leteron – pere de la Kanada Poŝtosistemo kaj la Esperanto-Societo Kebekia (ESK) – kaj ricevi respondon en Esperanto.



Avo Frosto preferas manskribitajn leterojn. Ne forgesu klare skribi viajn nomon kaj adreson, kaj indiku la vorton “Esperanto” por certigi respondon en la ĝusta lingvo. Lia adreso estas:

**AVO FROSTO
NORDA POLUSO
KANADO - CANADA
HOH OHO**